

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 38-a BRAZILIO, JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2014 N-ro 153

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

FLORIANOPOLO: ASOCIO LORENZ PARTOPRENAS EN BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ



Preskaŭ 100 gesamideanoj ĉeestis la kunsidon de LORENZ en la 49-a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu realiĝis de la 24-a ĝis la 28-a de Januaro 2014, en la urbo Florianopolo. Profesoro José Passini, Doktoro pri lingvoscienco, prelegis, en Esperanto, pri “Reenkarniĝo laŭ Spiritisma Vidpunkto”.

En Bona aero, Argentino, okaze de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, en Julio 2014, Passini kaj aliaj spiritistoj partoprenos Rondan Tablon de Eldonejo Lorenz, pritraktante la saman temon de la BKE kaj ankaŭ “Reenkarniĝon en la Biblio”. Profitante la okazon de la realigo de tiu grava esperanta evento en Florianopolo, la ELDONEJO organizis prelegon dum la sama semajno de la Brazila Kongreso de Esperanto ĉe Spiritisma Centro “Amor e Humildade do Apóstolo” (= Amo kaj Humileco de la Apostolo). La direktoro de LORENZ, João Silva dos Santos, prezentis la temon “La Vivo de F. V. Lorenz kaj Esperanto”, en la portugala lingvo.

LEGU PLI SUR LA PAĜO 4



D-ro Passini prelegis dum Brazila Kongreso de Esperanto




La prezidanto de la Spiritisma Centro bonvenigas la esperantistojn. Ĉe li estas Robinson Mattos



Publiko ĉeestanta la prelegon en la Spiritisma Centro

AMIKOJ DE LORENZ

KOMUNIKOJ brakumas la karan samideanon **JORGE ANDRÉA DOS SANTOS**, brazila spiritisto, 97-jaraĝa, konsilanto de Eldonejo Lorenz, verkisto kaj psikiatro. Li verkis pli ol 20 librojn, preskaŭ ĉiuj eldonitaj de Eldonejo Lorenz. Andréa estas tre konata en kaj ekster Brazilo. Ni vidas sube kovrilon de unu el liaj libroj en la portugala lingvo, "Reenkarniĝo, la Granda Leĝo". Dankon, kara Frato Jorge Andréa!



VIVO KAJ MORTO

Se vi la vivon amas, vivu bone,
Laŭ Leĝoj de l' Sinjoro, l' Eternulo;
Ne plendu, ne lamentu, ĉar duone,
Misvivas tia homo, kvazaŭ nulo.

En ĉio vivo pompas: en la floro,
En la ŝtoneto, en la sunradio,
En akvoguto, en la grajn' de oro,
Eĉ en silent' de l' cindro – viv' en ĉio.

Se do la vivo ĉie bolas, ĉu
Ekzistas morto? Grava jen problem'!
Signifas vivon aktiveco; nu,
Se iu stagnas, li jam mortis mem...

19/6/1961

A. Dombrowski [Spirito].

BAZA KURSO EN LA URBO "JUIZ DE FORA"

Nia amikino **MARIA NAZARÉ LAROCA** realigas bazan kurson de Esperanto en Spiritisma Centro "Ivon Costa". En la unua leciono ĉeestis 51 personoj, inter ili Profesoro José Passini. La instruistino uzas interretajn rimedojn dum la lecionoj.

Bonan laboron al nia kara samideanino!



KUNLABORU! COLABORE!
Membriĝu ĉe **LORENZ** kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

Associe-se à **LORENZ** e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

CARREIRO NETO, Luís da Costa Porto. *Mediuma Poemaro*. Poemoj originale verkita en Esperanto, de pluraj aŭtoroj, medieme skribitaj. Aranĝis la poemojn kaj tradukis la antaŭparolon A. K. Afonso Costa. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1972. p. 71.

LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 38-a – n-ro 153 – Januaro-Februaro-Marto 2014

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: + 55-21-2450-4768

Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: [Editora Lorenz](https://www.facebook.com/EditoraLorenz) | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

90-32 (o. v. II-23) – “La Esperantisto”, 1890, p. 54-55

Sinjoro Fr. Vl. Lorenc konsilas, ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu anstataŭ ili kaj anstataŭ “h” – apostrofon returnitan post la litero; ekzemple “ac’eti” anstataŭ “aĉeti” aŭ “acheti”. De nia flanko ni devas nur peti, ke se oni volos uzi tiun ĉi konsilon, oni ne forgesu

klarigi en la komenco de la presata verko la signifon de ĉi returnita apostrofo.

90-24-a p. al Runstedt, 3(15). X. 1890. (rh)

Tre estimata Sinjoro!

Laŭ Via poŝta karto mi sendas al Vi hodiaŭ 200 ekzemplerojn de la vortareto por Svedoj. Estis al mi tre agrable sciigi ke Via traduko de la “Tabellarische Übersicht” baldaŭ eliros; tuj kiam mi ricevos ekzempleron, mi sciigos pri ĝi en “La Esperantisto”. La neakurateco en “La Esperantisto” baldaŭ finiĝos, ĉar de la No. 10 la gazeto transiras al mi, kaj mi ĉiam zorgados pri plena akurateco.

Kun kora saluto, Via L. Zamenhof

90-29 Al s-ro P. en Kjaĥta. (o. v. II-20)

Mi ŝanĝis mian loĝejon, kaj tial leteroj al mi devas nun esti adresataj ne “Przejazd No. 9”, sed: “Nowolipki No. 21”. Sed la plej bone kaj la plej certe estas adresadi la leterojn ĉiam simple: “Al Dro. L. Zamenhof en Varsovio”. Leterojn kun tia adreso mi ĉiam ricevados la plej akurate, kie ajn mi loĝos.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof: originalaro 1: unua etapo de Esperanto: 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989. p. 322, 330 kaj 342.



AGO-TAGO EN RIO-DE-JANEJRO

Laŭ informo de la brazila samideano Evandro Cabloco, la 8-an de Marto 2014, EKOR (ESPERANTA KUNFRATIĜO DE OKCIDENTA REGIONO), unu el la plej aktivaj esperantistaj organizaĵoj en Rio-de-Janeiro, Brazilo, efektivigis sian Ago-Tagon en la kvartalo Bangu, kiam diversaj EKOR-anoj propagandis por Esperanto. Gratulon al niaj karaj samideanoj!

KION MI FARAS POR ESPERANTO – RAPORTO DE NIA AMIKO ALEXANDER MARTINEZ, EL KUBO

Mi estas aktiva esperantisto nacie kaj internacie, kaj korespondas kun eksterlandanoj tra la tuta mondo pere de Esperanto ekde 2011. Mi aprobiĝis en la elementa kaj baza ekzamenoj de Kuba Esperanto Asocio kaj ankaŭ en la baza kaj mezgrada ekzamenoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS-RSM/Filio Meksikio). Nun mi estas estrarano en nia filio, kie mi prizorgas pri publikaj rilatoj kaj edukado kaj kunordigas amikecan projekton inter nia filio kaj aliaj eksterlande. Mi estas individua membro de UEA, SAT kaj ILEI. Mi pensas pri la estonteco de nia lingvo, kaj konsideras ke en niaj ŝultroj estas la respondeco pri nia lingva heredaĵo.
Alexander Dumían Martínez Agüero | retadreso: alexander@embergrm.alinet.cu

7-a BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ EN FLORIANOPOLO



Uj post la fino de la 49-a Brazila Kongreso de Esperanto, je la 28-a kaj 29-a de Januaro, BAES (BRAZILA ASOCIO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ) okazigis la 7-an Brazilan Renkontiĝon de Esperantistoj-Spiritistoj (BRES), dum kiu diversaj samideanoj prelegis pri spiritismaj temoj. Ankaŭ realiĝis en tiu oportuno la Asembleo de BAES, kaj ties nova estraro elektiĝis por la periodo 2014-2016. Jen fotaro de la 7-a BRES:

Partoprenantoj en la 7-a BRES:



Partoprenantoj en la 7-a BRES.



Affonso Soares.



Elmir dos Santos Lima.



Geamikoj de Lorenz ĉe nia budo.



Givanildo Ramos.



João Sérgio Seli.



José Passini.



José Sartori.



Neide Barros deklamas.



PENSOJ DE ISMAEL GOMES BRAGA EL LA LIBRO "VETERANO?"


"De nun, tamen nia civilizacio konfesas per la buŝo de siaj plej altaj reprezentantoj, ke vole-nevole ĝi devas ŝanĝi sian vojon kaj fariĝi pli homarana. Homamo ja ne estas simpla fantazio de revemaj idealistoj, sed nepra bezono por la vivado mem de l'homaro. [...] Nova ideo pri homaranaj devoj sin trudas do eĉ al malmolkoraj egoistoj, kaj ĉiu homo fine komprenos, ke homamo, solidareco, interdependo, reciprokeco, aŭ homfrateco ne estas simpla revo de filozofoj kaj religianoj, sed natura leĝo, kiun oni ne rajtas malobei."

BRAGA, Ismael Gomes. Veterano? – Respondoj al la demandaro por la "Festo de la Veteranoj", aranĝita de la Jubilea Kongreso de Esperanto, Aŭgusto 1937 kaj Originalaj Artikoloj. 2-a eldono reviziita kaj pligrandigita. ĉap. "Homamo trudata de l' progreso". Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1965. p. 66-67.

EL LA EVANGELIO

OBEEMO KAJ REZIGNACIO

“Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron. Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj”. – Mt 5:5 kaj 9

a doktrino de Jesuo instruas ĉie la obeemon kaj rezignacion, du virtojn kunirantajn kun dolĉeco kaj tre viglajn, kvankam la homoj erare ilin konfuzas kun la negacio de la sento kaj de la volo. La obeemo estas la konsento de la racio; la rezignacio estas la konsento de la koro; ambaŭ estas agantaj fortoj, ĉar ili portas la ŝarĝon de la provoj, kiun la malprudenta ribelo igas la homon delasi. La malkuraĝulo ne povas esti rezignaciema, same kiel la fierulo kaj la egoisto ne povas esti obeemaj. Jesuo estis la enkorpiĝo de tiuj virtoj malŝatataj de materialistaj antikvuloj. Li venis en la momento, kiam la roma socio estis pereanta en la svenoj de la koruptado; li venis, por brili en la sino de la senfortiĝinta homaro la venkojn de la sinofero kaj de la karna rezigno. (Lazaro. Parizo, 1863.)

KARDEC, Allan. **La Evangelio laŭ Spiritismo**. El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. ĉap. 9 – Feliĉaj tiuj, kiuj estas mildaj kaj pacamaj. § 8 – Obeemo kaj rezignacio.



ALLAN KARDEC

LA EVANGELIO
LAŬ
SPIRITISMO



ESPERANTISTAJ POETOJ

ESTAS MI ESPERANTISTO

Julio Baghy

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto,
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
“Netuŝebla Fundamento”.
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
“Bonan tagon! Ĝis revido!”
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikis,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.


Por la venko mi esperas,
sed nenion mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento,
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort’ ĉe tombo mia
staros “rondo familia”,
nekologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

Poemo de Julio Baghy el la verko “Esperanta Antologio: poemoj 1887-1981”,
dua eldono, reviziita kaj kompletigita, eldonita de UEA en 1984.

Julio Baghy (1891-1967), hungaro, aktoro kaj reĝisoro de diversaj teatroj. Okaze de la unua mondmilito, li pasigis ses jarojn en Siberio kiel militkaptito. Tie li gvidis multajn Esperantajn kursojn por diversnacianoj. Post la milito, alveninte al Hungario li fariĝis aktiva esperantisto kaj interalie estis unu el la ĉefredaktoroj de “Literatura Mondo”. Baghy verkis poemojn, novelojn, romanojn, dramojn ktp. Estis membro de Lingva Komitato kaj poste de la Akademio de Esperanto. Jen kelkaj el liaj plej konataj verkoj: “Preter la Vivo”, “Pilgrimo”, “Migranta Plumo”, “La Vagabondo Kantas”, “Printempo en la Aŭtuno”, “Viktimoj”, “Hura”, “Verdaj Donkiĥotoj”, “La Teatra Korbo”, “La Verda Koro”, “Songe sub Pomarbo”, “Koloroj”, “Ĉielarko”, “Aŭtunaj Folioj” kaj “Sur Sanga Tero”.

(Resumo el informoj trovitaj en “Ordeno de Verda Plumo: leksikono pri esperantlingvaj verkistoj”, verkita de Josip Pleadin k eldonita de GRAFOKOM en 2006.)

LEGANTE ALMANAKON LORENZ

Invitas niajn legantojn rememori interesajn artikolojn publikigitajn en ALMANAKO LORENZ. Ni legu ĉi tiujn afablajn vortojn de nia itala amiko **RENATO CORSETTI**:

Mi ne bezonas paroli pri la frateco por spiritistoj en ĉi tiu Almanako. Mi volas nur klarigi al la nespirtistoj, ke "frateco" estas unu el la vortoj plej oftaj en spiritismaj paroladoj kaj skribaĵoj. Ankaŭ Esperanto estas akceptata de la spiritistoj pro tio, ke ĝi estas ilo de frateco. [...]

La manko de frateco portas nian mondon al ruino. Eble oni sukcesas ankaŭ fizike detruigi ĝin en la venontaj jardekoj pro

finuzado de la rimedoj kaj varmigado de la tuta planedo. Pro tio mi amas la spiritistojn, kiuj patose kaj daŭre parolas pri frateco kaj vokas vin "frato".

Ili vivas en stranga mondo, en kiu ne ekzistas Kaino kaj Abeloo sed nur du Abelooj, kaj ili provas porti nin ĉiujn al tia mondo. Ĉu ili sukcesos, mi ne scias, sed mi scias, ke valoras provi pri tio.

ALMANAKO LORENZ. Tridek-tria numero. Jaro 2013. Spiritistoj parolas pri frateco – la mondo parolas pri malfrateco. Teksto de Renato Corsetti. Rio-de-Ĵaneiro: Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz, 2013. p. 31-42.

Ankaŭ pri **ALMANAKO LORENZ**, ni dankas al nia amikino **JARMILA RYZNAROVÁ**, el Ĉeĥa Respubliko, pro ŝia ĝentila letero:

Pasintsemajne mi ricevis Vian ALMANAKON LORENZ 2014, por kiu mi ege dankas. Kvankam mi havis multe da alia laboro, mi ĉion lasis kaj kun granda intereso mi legis kaj legis. Pli ol duonon de tiu bela libro mi tralegis. Fakte ĉiun jaron Via almanako akiras pli belan aspekton kaj ankaŭ enhavo estas tre interesa.



FINFINE, ALMANAKO LORENZ 2014 ALVENIS!

La lanto de Almanako Lorenz 2014, ni efektiviĝos okaze de la Brazilia Kongreso de Esperanto, en Florianopolo, kaj ankaŭ en la Universala Kongreso, en Argentino. Tamen, jam eblas ĝin akiri hodiaŭ mem kaj legi interesajn artikolojn, kiel ekzemple de Jarmila Různarová (Ĉeĥio) pri la temo Miaj travivaĵoj en la dua mondmilito - rememoro; Renato Corsetti (Italio): Ke la Amo Regu niajn Korojn; Trevor Steele (Aŭstralio): Sciencismo kaj skeptikeco; Roy MacCoy (Nederlando/Usono): Tiam kaj Nun: Kelkaj Rimarkoj post 25 jaroj en la Centra Oficejo de UEA... kaj ankaŭ tre interesajn kronikojn de brazilanoj kaj rican intervjuon kun la brazila veterano Affonso Soares. Do, karaj, jen grava oportuno por akiri la enhavrican ALMANAKO LORENZ 2014!

Lanĉa prezo: 3 eŭroj

NI SERĈU FERVORE

"Sed vi deziru forte la pligrandajn donacojn. Kaj ankoraŭ pli preferindan vojon mi montras al vi." – Paŭlo. I Kor 12:31

[...] Estas nepre necese antaŭeniri, ja plibonigante ĉion ĉirkaŭe, ĉar la Evangelio sankcias nenan senlaboran atendadon. Nepre necesas, ke ni inklinu al la akirado de pli noblaj ecoj de la intelekto kaj de la koro, sublimigante nian nemorteman individuecon. Kleriĝo kaj sanktiĝo, pere de laboro kaj frateco, elstaras kiel devo por ĉiuj homoj. Perfektiĝado estas al ĉiuj komuna celo.

Ni fervore serĉu la plialtigon de ni mem, markante ĉie ajn nian ĉeeston per la beno de la servado al ĉiuj, kaj tuj kiam ni integriĝos al la nobla laboro per senĉesa, persona agado por la bono, tiam la Plejalto vidigos al ni pli lumajn suprenirajn vojojn.

XAVIER, Francisco Cândido. **Fonte viva** (= Viva fonto). Per la Spirito Emmanuel. Rio de Janeiro: Brazilia Spiritisma Federacio, 1956. ĉap. 54. Publikigita en Esperanto en la revuo Reformador, Decembro 1988, p. 367.

